


KOMENCANTO

gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Nina Vinnikova
INOVOALTAJSK, Ruslando

2000

redakcie — esperanto kaj literaturo — aforismoj
filozofie kaj lirike — amuzaj rakontoj el post la montoj
krucvortenigmoj pri bestoj — anekdotoj — korespondul

1

PERANTOJ de KOMENCANTO

laŭ ĉi-subaj adresoj vi povas aboni nian gazeton

ARGENTINO

Argentina Esperanto-Ligo, Caşilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

AŬSTRALIO

Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

BRAZILIO

Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

BRITIO

Esperanto-Asocio de Britio, 201 Felixstowe Road, Ipswich, IP3 9BJ

ĈEĤIO

Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1, CZ-696 62 Stráznice

DANIO

La Gazetoservo de Danio. Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800, Nykøbing F.

ESTONIO

Virve Ernits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn

FRANCIO

- Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

- R.Melo, 34, Av. de Russie, FR-03700, Bellerive S/A

GERMANIO

Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

IRANO

Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

ITALIO

Itala Esperanto Federacio, Via Villorosi, 38, 20143, Milano.

ITALIO, KROATIO, SLOVENIO

Višnja Branković, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste

KUBO

Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, HAVANO

LITOVIO

Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

NORVEGIO

Norvega Esperantista Ligo, Ojaf Schous vei 18, N-0572 OSLO

POLLANDO

Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

SVEDIO

SEF, Lisbet Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE — 24294 Hörby

SVISLANDO

Christoph Scheidegger, Im Schlegel 6, CH — 4224 Nenzlingen

USONO

Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

redakcie

Karaj legantoj!

Antaŭ vi estas la 1-a kajero de KOMENCANTO-2000.

En ĝi vi trovos: la novan ĉefan temon "ESPERANTO kaj LITERATURO". Ni esperas, ke tiu nova "ĉefa temo" okazos utila kaj interesa por vi. Pri la detaloj de la redakcia plano bonvolu legi en la enkondukita artikolo sur la paĝo 3.

Sur la paĝo 4 - "Ilustrita vortaro de literaturaj terminoj". Sur la kvina paĝo tardicias aforismoj. "Filozofie kaj Lirike" okupas du sekvajn paĝojn. Amikeco, Soleco, Noktaj steloj - liriko de niaj aŭtoroj el Francio, Italio, Ruslando. Ilin akompanas belegaj filozofiaj desegnaĵoj de nia nova desegnisto Naila Sădretdinova el Taŝkento, Uzbekistano.

La sekva rubriko "Amuzaj rakontoj" kontrastas kun la antaŭa. Ni sukcesis kolekti aĥuzajn historietojn, kiuj okazis al niaj aŭtoroj persone.

Rubriko "Enigmoj" ĉi-foje apartenas al diversaj animaloj. Ni senpacience atendas viajn solvojn de tiuj krucnigmoj.

Plene tradicias anekdotoj kaj korespondadresoj.

Vi rimarkos, ke ĉi tiu ĉi kajero abundas tre bonaj desegnaĵoj de Nina Vinnikova, Artur Ĥismatullin, Jurij Per-evalov, Bill Thorne kvante eĉ pli ol kutime.

Fine ni raportas, ke KOMENCANTO ekhavis novajn perantojn, en Danio kaj Norvegio, aldone al nia pasintjara listo.

AGRABLAN LEGADON!

La REDAKCIO de KOMENCANTO
dankeme akceptas DONACOJN por prospero de nia
gazeto. DANKON!

KOMENCANTO

2000 numero 1 / refondita en 1997 / 8 numeroj jare

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev

konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova

adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Ruslando

retpoŝto : let@epost.uralpost.ru

abontarifo por 2000:

internacia tarifo: 13 eŭroj aŭ \$14;

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo \$11;

aŭ por ĉiuj — 15 IRK

konto ĉe UEA: vkud-a

ruslanda tarifo kaj la rubla zono: 77 рублей

(за 8 номеров в год) простым почтовым переводом на имя Кудрявцева Виктора Васильевича: 620041, Екатеринбург, а. я. 132

redakto-fino de: "K" - 2'2000 la 29-a de februaro

ESPERANTO kaj LITERATURO


Karaj amikoj!

La ĉefa temo de "K" en la pasinta jaro, "ESPERANTO kaj TURISMO" respegulis tiun sferon de la lingva uzado, kiel interhomaj rilatoj, vojaĝoj tra la mondo, komuniĝo per Esperanto. En ĉi-jaro ni volus direkti vian atenton en la alian sferon de la lingva aplikado, ne malpli gravan ol la antaŭa. Tio estas Esperanta Literaturo, kiu permesis uzi artajn eblojn de la lingvo kaj aperis preskaŭ sammomente kun la apero de la lingvo mem.

La elekto de ĝuste tiu ĉi ĉefa temo en "K" ne estas hazarda: la redakcio opinias, ke koni klasikan E-literaturon kaj, kompreneble, plej interesajn modernajn aŭtorojn kaj iliajn verkojn gravas por ĉiu esperantisto, speciale por komencanta. La elekto de supremenciita temo ne hazardas des pli, ke multaj el la legantoj de nia gazeto mem provas fari siajn unuajn paŝojn en la esperantan literaturan mondon: ili penas verki poeziaĵojn kaj prozaĵojn.

La skeptikuloj diris kaj diras, ke Esperanto eble taŭgas nur por esti kodo en komercaj kaj informaj kontaktoj, ne pli. Tamen ili neniel argumentas siajn konsiderojn. Ĉar ne ekzistas argumentoj. Sed fakto estas tio, ke Esperanto, kiel ĉiu vivanta lingvo havas sian riĉan literaturon, kun ĝia historio, de kiu ni volas komenci nian ekskurson en esperantan literaturan mondon.

La historion de la esperanta literaturo oni dividas en tri ĉefajn periodojn, kiujn limas la du mondmilitoj. La unua periodo



daŭriĝis ĝis la unua mondmilito. Ĝin karakterizas tio, ke dum tiu ĉi tempo laboris kaj efikis Zamenhof, la aŭtoro de la lingvo. Jam en "La UNUA LIBRO" de Zamenhof, aperinta en la 1887 jaro, oni renkontas du liajn originalajn poemojn, "Mia penso" kaj "Ho, mia kor".

En la unua periodo oni faras ankoraŭ subdividojn. En la unuaj sep jaroj estis subperiodo de diskutoj pri diversaj formoj de lingva reformo. En 1894 Zamenhof aranĝis voĉdonadon, kies rezulto estis rifuzo de ĉiuj reformoj kaj akcepto de la lingvo, originale verkita de Zamenhof. Nur post tio eblis literatura evoluo. En tiu ĉi jaro aperis traduko de "Hamlet", kiu iĝis kvazaŭ la starta signalo de la literatura evoluo.

La dua subperiodo estis nomita subperiodo de disvolviĝo. La famaj aŭtoroj de tiu periodo estis, krom Zamenhof mem, *Antoni Grabovski* (la plej grava traduko - "Sinjoro Tadeo" de Miceviĉ), *Vasilij Devjatnin* (originala poezio kaj tradukoj el Puŝkin), *Leo Belmont* - pola ĵurnalisto kaj

tradukisto (poemkolektoj "Sonoj esperantaj" *Antoni Kofman* (Tradukoj el multaj klasikajoj de Goete, Hejne, Homero, Byron), *Kabe* estas pseŭdonimo de *Kazimierz Bein*, (tradukoj de Grimm-fabeloj, Turgenev-verkoj, "La Faraono", de B.Pruss.), *Edmond Privat* (fondis la revuon "Juna esperantisto", la ĉefverko "Vivo de Zamenhof" kaj "Historio de la lingvo Esperanto").

La Dua periodo estas tiu inter la du mondmilitoj. Tiun periodon karakterizas plia disvolviĝo de lingvo kaj literaturo, samtempe alfrontas unu la alian du tendencoj: Germana tendenco kaj Budapesta skolo. La germana tendenco preferis logikecon en la arta kreado, la Budapesta skolo salutis la lingvon vivantan kun ĝiaj neologismoj, idiotismoj, apartiĝoj. En tiu periodo aperis "Plena vortaro de Grosjean" de Maupiu kaj la "Plena gramatiko" de Kalocsay kaj Waringhien. Famaj aŭtoroj de tiu tempo estis Julio Baghy - aktoro, reĝisoro, verkisto, poeto, lingvo-instruisto, akademiano. Lia mult-flanka laboro estas vere grava kontribuo en

originalan E-literaturon. Same indas menci *Kalman Kalocsay* - doktoro de medicinaj sciencoj, ĉefredaktoro de "Literatura mondo", unu el ĉefaj figuroj de la esperanta poezio. En la sama tempo kreadis tiuj verkistoj kiel *Hilda Dresen*, *Raymond Schwartz*, *Vladimir Varankin*, *Nikolao Hohlov*, *Vasilij Eroŝenko*, *Eŭgeno Lanti* kaj multaj aliaj.

En la tria periodo, post la dua mondmilito, revenas granda disflorado en E-literaturon. Krom la reviviĝinta Budapeŝta skolo, aperis la Skota skolo, (*W.Auld*, *R.Rossetti*, *J.Dinwoodie*, *J.Francis*); aktive verkis en ĉi-periodo anglaj (*M.Boulton*, *Gregor*), ĉeĥoslovakaj (*J.Pumpr*, *K.Piĉ* kaj aliaj), brazilaj (*F.Lorenz*, *G.Matos* kaj aliaj), bulgaraj (*J.Georgiev*, *A.Griĝorov*), farncaj (*G. Waringhien*, *J. Ribillard*, *H. Baŭpierre*, *Lorjak*), danaj kaj germanaj, polaj, hungaraj, japanaj, jugoslaviaj, sovetaj ktp aŭtoroj.

Dum la kvindekaj kaj sesdekaj jaroj prosperis la literaturaj periodaĵoj "La Nica literatura revuo", "Norda prismo", "Suda stelo", "Monda kulturo", "Literatura foiro", kaj aliaj. En tiu ĉi periodo vigliĝis libroeldonado, multiĝis eldonejoj: "TK-Stafetp", "Hungara E-Asocio", "L'Omni-buso", "Ĉina E-eldonejo"; Eldonejo de UEA, Eldonejo de UFE en Francio, "Eesti Raamat" (en Sovetio), kaj aliaj.

Supremenciitan ĉefan temon de **KOMENCANTO** — **ESPERANTO** kaj **LITERATURO** ni komencis en tiu ĉi numero per prezentita al via atento mallonga skizo de E-Literatura historio. En la vicaj numeroj de "K" ni planas konatigi vin kun famaj esperantaj verkistoj, klasikaj kaj modernaj, kun iliaj plej famaj verkoj

ILUSTRITA VORTARO de LITERATURAJ TERMINOJ

En nia VORTARO la terminoj viciĝas ne laŭ la alfabeto sistemo, sed laŭ bezono de klarigoj de la antaŭaj artikoloj

LITERATURO — 1. Tuto de la spirita verkoj, koncernantaj la vivon kaj kulturon de iu nacio, epoko 2. Tuto de la verkoj, presajoj ktp pri iu temo

PROZO — Ordinara parolo, ne aranĝita laŭ versmezuro.

PROZA - 1. Rilata al prozo 2. Ne prezentanta poeziecon, noblecon, idealajn trajtojn & *banala, plata, triviala*

PROZAĴO — Peco verkita en prozo

PROZISTO — Verkisto en prozo

POEZIO — 1. Arto komuniki emociojn per la muziko de la parolo, obeante iajn metrikajn regulojn 2. Ĉiu el la ĝenroj, en kiu esprimiĝas tia arto: *lirika poezio* 3. Beleco, elvokforto de la ideoj, bildoj kaj stilo, sendepende de la metrika formo: *ŝiaj leteroj estas plenaj de poezio*

POEZIA — Rilata al poezio 2. Havanta la ecojn de la poezio, krom la formo: *poëzia prozo*.

POEZIAĴO — Versa peco, ne tro longa

POEMO — 1. Versa verko, ordinare altstila kaj relative longa: *La Homeraj poemoj* 2. Artproza mallonga verko: *La poemoj en prozo de Turĝenev*

POETO — 1. Verkisto de diversaj verkoj 2. Homo kun grandaj povoj de imago, esprimado ks.

POETIKO — 1. Poezia sistemo de unu poeto, skolo aŭ epoko

2. Traktado pri la regiloj de la versa verkado kaj komponado

3. Scienco pri la poezio & *retoriko*

VERKI — Per spirita laboro, krei aŭ produkti ion novan en scienco aŭ arto: *verki novelon, operon*,

VERKO — Arta aŭ scienca produkto de la spirito


VERKADO — Laborado de tiu, kiu verkas.

VERKARO — Tuto de la verkoj de unu aŭtoro: *la verkaro de Zamenhof*

VERSO — Aro da vortoj, aranĝitaj laŭ la valoro aŭ nombro de iliaj silaboj, konsistiganta stilistikan unuon, kun regula kontinueco kaj regula periodeco & *ritmo, rimo, strofo*

VERSAĴO — Poeziaĵo

VERSISTO — Tiu kiu verkas versojn, rigardata senkonsidere pri la inspiro



A FORISMOJ

Uzante la okazon ni invitas ĉiujn novajn abonantojn de KOMENCANTO aktive kontribui por la enhavo de nia gazeto.

La plej oportuna kontribuajo por komenco estas tradukoj de viaj ŝatataj aforismoj. Trduku ilin kaj sendu al la redakcio, kaj ni publikigos vin!

Yonier Cables Solis

[HÓLGUIN, Kubo]

PROVERBOJ

-- Amo estas forta, sed mono pli forta

* * *

-- Avarulo kaj porko estas bonaj post la morto

⊗ ⊗ ⊗

Andre Metzeler

[CEBAZAT, Francio]

Se problemo ŝajnas al vi nesolvebla, prenu:

- 1 saketon da kvieteco
- 1 tabloidon da retroiro postan matenon:
- 1 kuleron da prudentio
- 10 gutojn da rigoreco
- 1 dozon da analizo

⊗ ⊗ ⊗

Stanislav Kacko

[KURGAN, Ruslando]

La historio estas devigata ripetiĝi, ĉar por la unua fojo ni tro malmulte atentis ĝin.

* * *

(Bleki Šerrod)

Leteroj proksimigas la animojn pli forte, ol kisoj.

(Gon Donn)

Oleg Nekludov

[BUZULUK, Ruslando]

Oni diras, ke inter du homoj la tria estas superflua. Ne tute veras.

La tria estas ne superflua, sed rezerva.

* * *

Breloko por ŝlosiloj estas tia grava aĵo, kiu permesas perdi kelkajn ŝlosilojn samtempe

⊗ ⊗ ⊗

El populara semajna ruslanda ĵurnalo "Argumentoj kaj faktoj"


Elektis kaj esperantigis:

Sergeo Fedotov

[NEFTEKAMSK, Baŝkirio, Ruslando]

Se vi tro multon scias, oni ne permesos al vi maljuniĝi.

(A.Rjabcev)



Jurij Perevalov, [LEŜNOJ, Ruslando]

Ju pli la homo estas maldiligenta, des pli lia laboro similas al heroaĵo.

(N.Maksimova)

* * *

Naskiĝis mem — helpu al aliaj!

(L.Imanova)

* * *

Al nia popolo oni [nia registaro] jam tiom multon promesis, sed por ĝi tamen ĉiam nesufiĉas.

(B.Krutier)

⊗ ⊗ ⊗

Gregoro Riĉert

[LUZIWO, Pollando]


Ju malpli da espero, des pli da gajo,

Ju malpli da espero, des malpli da malgajo

Nicole NEDELEC . Esperantigis
Marje Louise Seguin
Jean André Metzeler
 [CEBAZAT, Francio]

AMIKECO

Kia mirinda io!
 Ĝi ne sin aĉetas,
 ĝi ne sin vendas,
 Tio estas kiel amo: ĝi sin donas.
 - Ne bezonas foriri por serĉi ĝin.
 Ŝur la bretaro de la ĉiovendejo
 Mi ne trovis ĝin.
 Sur apuda bazaro,
 mi ne vidis ĝin disigitan.
 - Tamen, ĝi estas tie ĉi.
 Tiu estas granda damo, ja ĉeestanta,
 kiun tro ofte, perforte, malame, indiferece oni
 faligas.
 - Mi renkontis ĝin
 En rideto, en rigardo,
 en oferta mano,
 En amaso da viroj kaj virinoj...
 - De la ĝojo de amiko, de najbaro, mi vidis ĝin
 ĝoĝi, iome da ĝia tempo mi vidis ĝin doni
 por amikeco al aliaj.
 Mi vidis ĝin sola tutkore kanti.
 Tiam, vidante ĉion,
 Mi diras ke la vivo bone eblas:
 Estas multaj ioj, por admiri, por krei;
 Multaj homoj por ami;
 Multaj belaj ioj por aŭdi, por lerni, por kompreni...
 - Ĉar estas la Akcepto,
 Ĉar estas la Espero.
 kaj ke kun tute tio
 Oni povus konstrui la PACOn.
 - Amikeco... mi amas ĝin.
 Ĝi estas mia vivĝojo.
 Ĝi estas kiel tuko kiun oni teksas.
 Tiu tuko vi ĉiuj Amikoj estas.
 Ĉiu el ĉiuj estas fadeno de lino
 Kies ĉiu koloro estas portanto de harmonio,
 Apartenas je ĉiuj, kaj ĝi mortos neniam.



Naila Sadretdinova, [TAŜKENT, Uzbekistano]

Ludmila Leksina
 [SUDĴA, Kurskaja obl., Ruslando]

Dum vespera vintra horo

De neĝo kovrita tero.
 Ĉielo neĝventega.
 Mi legas vian leteron
 Apud forno varmega.

Malfrua vespero. Silento...
 Hodiaŭ estas sabato.
 Kvietaj, trankvilaj momento,
 Murmuras apude la kato.

Sur tablo mielo kaj pomo,
 Aromas per lasta ŝomero.
 Dormetas jam ĉiuj en domo,
 Nur legas mi vian leteron.

Alla Utkina

[LESNOJ, Sverdlovskaja obl., Ruslando]

KIO ESTAS ŜTELOJ?

Dumnokte en malluma ĉielo aperas malgrandaj anĝeloj. Ili malfermas fenestretojn de iliaj lumaj dometoj kaj rigardas suben. Ni vidas ilin kaj ploras kaŭze de la kareŝemo.

Kiam ni tremas pro malvarmo, steloj surĵetas puntan jasmenan vesperon sur niajn ŝultrojn kvazaŭ ŝalo.

Iutempe anĝeloj donacas al ni falstelojn pro memoro.

La nokto estas malgranda vivo.

**Jurij Perevalov**

[LESNOJ, Ruslando]

Santi Elena Bullo

[MESTRE, Italio]

**PENSOJ PRI PERDITA
KAJ REAKIRITA
AMIKECO**

Ofte interparolis la amikoj
kiam ili hejmen revenis
vespere, post la lernejo.

En la varmega aero,
pepis malgrandaj birdoj;
kraketis la folioj
sub la dikaj ŝuoj.

Trankvile l'amikoj
Amuziĝis interparolinte.
Sed nun...

Finiĝis la infanaj revoj...

Finiĝis la amikeco
Fratmortiga milito dividis
Iliajn sortojn. Hazarde
Ili unu al la alia
en sama loko fronte estas.

Post nelonge...

Pro sama flamo falis
lastaj infanaj amikoj.

Kaj nun...

Sub la sama tero,
sub la sama tuko,
kiu funebre ilin tegas
senfine povas denove
la amikoj interparoli.

**Naila Sadretdinova**, [TAŜKENTO, Uzbekistano]

AMUZAJ RAKONTJOJ

Ludmila Leksina

[SUDĴA, Kurskaja reg., Ruslando]

KIU FORMANĜIS KAROTOJN?


Mia onklino havis malgrandan legomĝardenon. Foje ŝi rimarkis, ke malaperis kelkaj karotoj. Kuŝis sur tero nur karotaj folioj. Strange! Cirkaŭe estis forta barilo, interne estis fidela garda hundino Murza.

La onklino vokis Murza'n, montris la karotojn kaj diris: "Gardu, Murza, gardu!"

La hundino rigardis per siaj saĝaj okuloj kaj svingis la voston. Sed la karotoj malaperadis... Finfine restis nur kelkaj karotoj.

La onklino malgaje rigardis en la fenestron kaj subite ekvidis, ke Murza venis al la karotoj, elŝiris unu karoton kaj apetite formanĝis ĝin. Jen kiu estis la ŝtelisto!

Multaj hundoj ŝatas manĝi legomojn kaj dolĉajn fruktojn. Foje mi vidis hundon, manĝintan frambojn. Mia hundino Rema precipe ŝatas manĝi kukumojn. Kaj eĉ najbara hundo ŝtelas falintajn dolĉajn pomojn en mia ĝardeno.



sendviĉo kun lango

Esperantigis **Oleg Nekludov**
[BUZULUK, Ruslando]

NAJLETO

Ĉe unu sinjoro difektiĝis la akvotubaro. Venis al li riparisto. Kaj la sinjoro havis filinon-belulilon. Jen ŝi al la tubo-riparisto flustras je la orelo:

— Se la paĉjo proponos al vi multekostajn vinojn, vi ne drinku, se li promesos monon — ne prenu, sed petu de li najleton rustitan.

La riparisto ĝuste tiel faris.; ordigis la akvotubojn, prenis la najleton kaj foriris.

Kaj la patro la filinon ĉirkaŭbrakumis, ŝian kapon karesis kaj diris:

— Filino bravulino! Bonege ni trompis lin!

Jean André Metzeler

[CÉBAZAT, Francio]

(el la leteraj kursoj de la fervojistoj)

BONA REKLAMO por "VENKO de la AMO"

Amerika eldonisto forte esperis, ke lia nova libro "Venko de la Amo" havu furoran sukceson. Sed lia espero estis vana: post kelkaj monatoj, nur kelkaj centoj da ekzempleroj estis venditaj.

Tial, la reklamo-ĉefo de la koncerna eldonejo havis la ideon publikigi la jenan anoncon en diversaj ĵurnaloj:

"Juna, blonda, atleta, sportema kaj tre kulturita milioonulo deziras edziĝi al fraŭlino, kiu similas al la heroino de la romano: "Venko de Amo", skribu al B.H. ĉifro 7350"

La kvincent mil ekzempleroj de la koncerna libro estis venditaj post kelkaj tagoj.




desegnajojn alsendis

Artur Ĥismatullin

[TROICK, Ruslando]

EL POST LA MONTOJ



Jurij Perevalov
[LESNOJ, Ruslando]

Margarita Zujeva
[MOSKVO, Ruslando]

NIA EKSKURSO FINIĜIS!

(la vera okazaĵo)

Mi laboris kiel ekskursgvidanto (ĉiĉerono) sabate kaj dimanĉe, aparte kondukis busajn ekskursojn. En ekskursita buso la ekskursgvidanto kutime kun mikrofono okupas la antaŭan sidlokon post ŝoforo.

Foje mi, tre laca post du ekskursoj, revenis hejmen en la ordinara urbrafika buso, aŭtomate sidiĝis kiel kutime sur la antaŭan seĝon kaj ekdormis. Jen estas la fina haltejo, oni devas elbusiĝi! Mi ekstaris la unua, turnis min al la pasaĝeroj kaj laŭte diris:

— Nia ekskurso finiĝis. Multan dankon pro la atento. Ĝis revido! kaj forpaŝis el la buso.

Nur ekster la buso mi komprenis, ke ĝi ne estis ekskursal!


Esperantigis
Oleg Demjaŝev
[NABEREJNĴE ĈELNI,
Tatarstan, Ruslando]

MIA KARA


Mi vin amas! Pri tiu ĉi fakto,
Mi parolas al tuta mondo,
Sternas mi teren antaŭ vi, kara,
Kiel soifanto antaŭ la fonto,

Vidi vin estas plej granda ĝojo,
Ŝatas mi senvestigi vin plene,
Mi vin amas, vespere kaj nokte,
Certe tage kaj frumatene.

Ŝatas bani vin propramane,
Ĉiuj scias pri via belnomo,
Vin nenian perfidos, dividos,
Mia kara, bongusta TERPOMO.



*Mi ja petis
vin ne
telefoni al
mia laboro!*



alsendis **Artur Ĥismatullin**
[TROICK, Ruslando]

Martin Ginette
[SAULXURES,
SUR MOSELOTTE, Francio]

STRANGA (sed efika) RIMEDO

Tiu rakonto estas vera anekdoto, kiun spertis mia avo, la patro de mia patro, kaj tiu lasta raportis al mi.

Unu tagon, ĉirkaŭ la jaro 1900, la tubo de la familia necesejo estis ŝtopita de malpuraĵo. La akvo ne plu povis flui eksteren. Kiel ripari? La ŝtopaĵo estis ne-aĝingbla.

Iu sukcesis kapti rivero-raton (fortika rato, kiu vivas en riveroj, kaj nutras sin per restaĵoj de manĝo kaj diversaj malpuraĵoj). Oni metis la raton en la kuveton de la necesejo, oni fermis bone la kovrilon, kaj ... oni atendis.

Kiam pli poste oni malfermis la kovrilon, la rato estis malaperinta, kaj, mirakle!, la akvo denove bone fluis.

Kio okazis? La rato sukcesis trovi la nutran elirejon, kaj venki la ŝtopaĵon.

Samtempe ĝi solvis la problemon de la avo.

Ĉu oni devas plori pri la rato?

En tiu tempo, la akvoj de la necesejoj forfluis per tubego, poste trapasis diversajn terenojn, kie ili puriĝis, kaj fine ili atingis riveron.

La rato certe retrovis sian hejman riveron.


Vort-kruc-enigmo

MARAJ BESTOJ



Pentris kaj-kompilis
Yonier Cables Solis
 [HOLGUIN, Kubo]

Estas sufiĉe simpla vort-enigmo. Oni devas enskribi la nomojn de la maraj bestoj, kies desegnaĵoj estas pentritaj kontraŭ apuda kolumno aŭ linio.

Bonvolu sendi viajn solvojn al la redakcio!



VORT-BEST-ENIGMO de Tatjana Savina




h	u	i	r	d	o	b
d	n	b	o	i	v	o
o	k	a	t	n	o	h
ĉ	e	v	o	p	l	e
o	l	a	p	v	u	l
o	k	r	o	o	k	i

Savina Tatjana,
 [RUKAVEC, Pskovskaja obl.,
 Ruslando]

La tasko estas :
 trovi nomojn de la bestoj,
 kies bildojn vi vidas apude.
 La liter-ĉenoj povas situi en
 ajnaj direktoj - liven, dek-
 stren, suben, supren...

Ekzemple: heliko
 (la bildo de heliko, kompreneble,
 mankas)



Elena Jakovleva
[ARĤANGELSK, Ruslando]

Eliras kirurgo el la operaciejo kaj diras:
— Ni perdis la pacienton.
Ĉiuj parencoj esploris.
Tiumomente el la alia pordo de la operaciejo aperas timigita vizaĝo.
Doktoro kun ĝojo krias:
— Ni trovis lin!

Preparadas paciento por la operacio.
— Sinioro kirurgo, mi timas, ĉar mi faras tion por la unua fojo.
— Ne timu. Ankaŭ mi operacias por la unua fojo!

Babilas du psikiatroj:
— Mi havas interesan okazon en mia praktiko. Ĉe mia paciento okazis dis-du-op-iĝo de la personeco
— Kio do estas speciale interesa en tio?
— Mi sukcesis interkonsenti pri la pago kun anbaŭ aparte.

La doktoro demandas pacieron:
— Kio ĉe vi doloras?
Paciento kun miriĝita vizaĝo respondas:
— Vi studis dum ses jaroj kaj demandas diagnozon ĉe mi?

Mihail Ĥohrjakov [LESNOJ, Ruslando]

Parolas du najbaroj:
— Mia edzino estas simple anĝelete! - parolas unu
— Feliĉule, mia edzino estas ankoraŭ viva! - respondas la dua.



Yonier Cables Solis [HOLGUIN, Kubo]

— Infano.., Kion diros via patro, se aŭdos vin? - diras sinjorino al infano, kiu prononcis fi-vortojn sur la strato.
— Mi diros, ke estos miraklo, sinjorino, mia patro estas surda.

Oleg Nekludov [BUZULUK, Ruslando]


— Kial vi ĉiam havas tiajn malpurajn orelojn?
— Tial, ke mi ne havas la aliajn!

— Fraŭlino! Kial vi rigardas min kvazaŭ viaj gepatroj forveturis en ripozejon?

Artur Ĥismatullin [TROICK, Ruslando]

Renkontiĝas du studentoj.
— Kial vi estas tiom konsternita?
— Mi sendis leteron al la gepatroj kun la peto sendi al mi monon por lernolibroj.
— Kaj kio...?!
— Ili sendis al mi lernolibrojn!

Renkontiĝas du amikoj.
— Mj ne plu povas vivi kun mia edzino. Dum la tuta vivo ŝi tedas al mi: "Donu monon, donu monon..."
— Kial ŝi bezonas tiom multe?
Mi ne scias, mi ankoraŭ neniam donis...



KORESPONDU!

Ĉiu kadro kostas 5 rublojn aŭ 2 Internaciajn Respondkuponojn
Por pagintaj abonantoj de "K" - senpage

<p>s-ro <i>Anatoly Sidorov</i> 37 j., laboristo, dez. kor. tutmonde pri nordamerikaj indianoj. pk 1316 SYKTYVKAR Komi, RU-167031, RUSLANDO</p>	<p><i>Anna-Maria Bogren</i> 18 jaroj, muziko, dancoj, vojaĝoj. Mi serĉas fianĉon: brunaj okuloj, mahelaj haroj, 185 cm alta, volonte afroamerikano. Husensjovagen, 83a 25252, HELSINBORG SVEDIO</p>	<p><i>Anna Lonngvist</i> 18 jaroj, mi ludas bason en popbando. Mi estas vegetarano kaj batalas por la rajteco de la bestoj. Solrosvagen, 65 26040, VIKEN SVEDIO</p>	<p><i>Jenny Regnersen</i> 18 jaroj. Deziras korespondi kun samaĝuloj el Eŭropo. Ŝatas rolludoj, legado ka. Guldsmedsg. 19 25246 HELSINBORG SVEDIO</p>
<p><i>Louise Ekdahl</i> 18 jaroj, muzikas gitaron, ŝatas Rolling Stones, Oasis... Mi estas vegetarano kaj mi dancas Tingsgatan 3 25656 HELSINBORG SVEDIO</p>	<p>f-ino <i>Hannete Piirainen</i> 18 jaroj, Mi ludas tamburojn en popbando. Mi estas vegeta- rano, ŝatas fotadon kaj muzikon. Fridasgata 131 25654, RAMICSA, HELSINBORG SVEDIO</p>	<p><i>Katya Virginia de S. Ramos</i> 34 jaroj, pop-rok muziko 60-70 ja., infana literaturo kaj kuirarto. Prefere kun verkistoj, poetoj, tradukistoj Tv.Humaita, 1936 Marco. BR-66093-110, Belem, PA BRAZILIO</p>	<p><i>Balazsi Laszlo</i> 33 ja., romkatoliko, pri ekzotikaj fruktoj, plantoj, natio, vojaĝoj. Kor. kun knabinoj 20-30 jaraĵoj. Keszthely. Nagy Lajos Kir. ut. 14 8360 HUNGARIO</p>
<p><i>Timur Halilov</i> 12 jaroj, dancoj, japanaj luktoj, muziko p.k. 132 EKATERINBURG RU-620041 RUSLANDO</p>	<p>s-ino <i>Malgorzata Jonkisz</i> 39 ja., naturano, geografio, pupoj en naciaj kostumoj. Reciprokaĵ vizitoj. Kruczkowskiego 11/51 PL-93236, LODZ POLLANDO</p>	<p>s-ino <i>Salja Talvela</i> Kolektas bildkartojn kun kristanaj preĝejoj, bieretikedoj Valtatis 10 as 22, FI-46900 ANJALANKOS FINNLANDO</p>	<p>s-ro <i>Frank Wurft</i>, 27 jaroj, turismo, reciprokaĵ vizitoj Limmerstrasse 15d, DE-30451 HANNOVER, GERMANIO</p>
<p>s-ino <i>Martina Sechs-Bockelman</i> turismo, ebleco de reciprokaĵ vizitoj. Weldstrasse 13, DE-55442 STROMBERG, GERMANIO</p>	<p><i>Zaran Bozinovic</i> 14 ja., knabo, dez. kor. tm., pri muziko, libroj, amuzado k Esperanto. Dure Salaja 23 A/1, 19000 Zajecar, YUGOSLAVIO</p>	<div style="border: 1px dashed black; padding: 10px;"> <h2 style="text-align: center;">La FILATELISTO</h2> <h3 style="text-align: center;">adreslisto de filatelistoj</h3> <p style="text-align: center;">celas faciligi la senperajn internaciajn filatelistajn rilatojn</p> <p>La FILATELISTO eldonas laŭbezone liston de filatelistaj anoncoj, kiam ĝi estas ricevinta almenaŭ 40 petojn pri senpage enpresigo. Por ricevi la listojn, sendu al la eldonanto 12,5 francajn frankojn, aŭ 1,9 eŭrojn, aŭ 2 internaciajn respondkuponojn. Vi ricevos tute senpage la lastan eldonitan liston, se vi sendos al ni 10 adresojn de seriozaj filatelistoj, Via anonceto aperos en La FILATELISTO tute senpage</p> <p style="text-align: center;">Skribu: R.MELO, 34, Avenue de Russie, FR-03700 BELLERIVES/A. France</p> </div>	
<p>s-ro <i>Alcino Remos Alvez</i> deziras korespondi kaj interŝanĝi vizitojn Est Areics, Bl. B-2-D, S. Pedro Do Estorial PORTUGALIO</p>	<p>s-ino <i>Gunta Lepeta</i> 49 ja., tutmonde pri ĉiuj temoj. 13 Nod. Filozofu Iela. 69, P.N.S. Gintermuiza JELGAVA LV-3001, LATVIO</p>		

KOMENCANTO-2000

abono de KOMENCANTO-2000 kostas 77 ruslandajn rublojn
Internacie: 13 eŭroj al UEA-konto "vkud-a" aŭ ĉe via landa peranto

